

# Amsterdama Pioniro.

Officieel Orgaan der Unua Amsterdama Societo Esperantista.

(Eerste Amsterdamsche Esperantisten-Vereeniging)

Filio de la Holanda Societo Esperantista: „LA ESTONTO ESTAS NIA.”

(Goedgekeurd bij Koninklijk Besluit dd. 3 Mei 1907.)

---

**REDACTIE**

H. BLOK

J. DE HAAN

G. ANNEVELDT JR.



Adres van de Redactie  
en Administratie:

SINGEL 386

AMSTERDAM.

Medewerkers:

DREVES UITTEPDIJK, C. VAN DER ZELJDE, J. L. BRUIJN, ANDR. R. ZWAAN, e. a

Abonnem. p. jaar f 1,20 (1 Sm.) voor het buitenland f 1,50 (1,25 Sm.) franco p. p.

Voor leden en begunstigers der U. A. S. E. gratis.

ADVERTENTIEN: 10 cent per regel.

---

## Adiaŭ al niaj legantoj, kunhelpantoj k. t. p.

Estas tempo de veno kaj ankaŭ tempo de foriro. Kiam en la monato de Julio ni tri formis la redakcion kaj la administracion de la nova organo, „Amsterdama Pioniro”, ni faris tion kun la ideo, cedian lokon tiel baldaŭ kiel estus persono aŭ societo kiu volus transpreni tion de ni. Nuntempe ni estas al tiu momento: La Holanda Societo Esperantista eble transprenos la Amsterdaman Pioniron de ni kaj ni, fidelaj al nia promeso, ni tri forlasas nian lokon.

Ĉu la organo ankaŭ ŝanĝos sian nomon, sian formon, k. t. p. ni ne scias certe, sed eble jes. Kiel ajn ĝi estu, ni esperas ke la organo prosperu kaj ĝu gazeto, kiu prenos grandan lokon inter la aliaj ĉefaj esperantaj gazetoj.

Ni tutkore dankas ĉiujn niajn abonantojn, kunhelpan-

Er is een tijd van komen en ook een van heengaan. Toen in de maand Juli a. p. ons drietal de redactie en administratie vormde van het nieuwe orgaan „Amsterdama Pioniro” toen deden wij dat met het idee, onze plaats onmiddellijk te verlaten zoodra er een persoon of lichaam zoude zijn, dat die van ons zoude willen overnemen.

Thans is dat oogenblik gekomen: de Nederlandsche Esperantisten Vereeniging zal wellicht de „Amsterdama Pioniro” van ons overnemen en wij, getrouw aan onze belofte, doen dadelijk afstand.

Of het orgaan van naam, formaat, enz. zal veranderen, dat weten wij niet zeker, doch waarschijnlijk zal dat wel het geval zijn.

Hoe het ook zij, wij hopen gaarne, dat het orgaan bloeie

tojn, k. t. p. por ilia helpo  
kaj bonvoleco.

Kun salutoj kaj amikaj man  
premoj ni volonte restas

en een courant worde welke  
onder de andere hoofdbladen  
een voorname plaats zal inne-  
men.

Wij brengen onzen hartelijken  
dank aan alle onze abonné's,  
medewerkers, enz voor hunne  
hulp en welwillendheid.

Met groeten en vriendschap-  
pelijken handdruk verblijven  
wij gaarne

La redakcio kaj administracio

H. BLOK,

J. DE HAAN,

G. ANNEVELDT Jr.

**4e JAARLIJKSCHE ALGEMEENE VERGADERING**  
**der Nederlandsche Esperantisten Vereeniging „La Estonto**  
**Estas Nia” op Zondag 19 Juli a.s. des voormiddags ten 10½**  
**uur in het Grand Hôtel Coomans, Hoofdsteeg 12/22**  
**te Rotterdam.**

Punten van behandeling (Voor meer uitvoerige gegevens zie  
bijlage „Beschrijvingsbrief”).

1. Opening der vergadering.
2. Jaarverslag.
3. Rekening en verantwoording van den Penningmeester  
over 1907.  
Raming van ontvangsten en uitgaven over 1908.
4. Vaststelling der jaarlijksche bijdragen van de „Alge-  
meene en Afdeelingleden.
5. Benoeming van eene commissie voor het nazien der  
rekening en verantwoording van het verschenen en  
loopende jaar.
6. Idem voor het uitbrengen van een verslag van den  
bibliotheek.
7. Verkiezing van een Voorzitter.
8. Overname van de „Amsterdama Pioniro” van de Unua  
Amsterdama Societo Esperantista.
9. Verkiezing van een afgevaardigde voor het Congres te

Dresden.

10. Behandeling der ingekomen voorstellen van de Afdee-  
lingen Amsterdam, Rotterdam en Utrecht.
10. Rondvraag.

De vergadering zal duren tot c.a. 3 uur. Daarna van 4 tot 6 uur:

### BOOTTOCHT OP DE MAAS

ter bezichtiging der uitgebreide havens, aangeboden door de Rotterdamsche Esperantisten Vereeniging „Mercurio”,

---

### VERZOEK.

Met het oog op de jaarvergadering te Rotterdam verzoekt het Bestuur der Unua Amsterdama Societo Esperantista aan de Amsterdamsche vrienden, ten 8½ u. aan het Centraalstation aanwezig te zijn, ten einde alsdan gezamenlijk met trein 8.28 naar Rotterdam te vertrekken.

Voorafgaande kennisgeving aan het secretariaat verdient aanbeveling.

---

### Holanda Societo Esperantista Nederlandsche Esperantisten „La Estonto Estas Nia“.

La 10an de Junio okazis en Utreĥto estrara kunveno.

Oni priparolis inter aliaj aferoj ankaŭ la priskribleteron de la Jarkunveno en Rotterdam (la 19an de Julio) speciale rilate al la transpreno de la „Amsterdama Pioniro”. En principo oni estas tre favora por la transpreno kaj vidus volonte ke tiu organo iĝos la oficiala organo de la Societo. Rilate al tio oni decidis proponi dum la jarkunveno plialtigon de la jarkotizo por povi sendi la organon tiam senpage al ĉiuj membroj.

ROTTERDAM. Per la bonvoleco de sia samideano Sin-

### „La Estonto Estas Nia“.

Den 10 Juni l.l. vond te Utrecht eene Bestuursvergadering plaats.

Onder anderen besprak men daar ook den beschrijvingsbrief van de Jaarvergadering te Rotterdam (den 19en Juli) voornamelijk met het oog op de overname van de „Amsterdama Pioniro”. In principe is men wel gunstig gestemd voor de overname en zoude men gaarne zien, dat dit orgaan het officieele blad werd van de Vereeniging.

In verband daarmede besloot men op de jaarsvergadering eene verhooging van de jaarlijksche contributie voor te stellen, teneinde alsdan het orgaan gratis aan al de leden te kunnen toezenden.

ROTTERDAM. Door de welwillendheid van den Heer

joro Allard, Direktoro de la Granda Hotelo „Coomans”, la Rotterdama Societo Esperantista „Merkurio” havas nun senpage belegan salonon en la nomita hotelo, kie ĝi nun kunvenas ĉiusemajne ĵaudon je la oka horo.

Gastoj estos ĉiam bonvenaj!

La direktoro de la monatgazeto „De Handel” Sinjoro J. J. Hoogewerff bonvole konsentis akcepti de la Rotterdama Societo Esperantista „Merkurio” artikolojn pri „Esperanto”. Tiuj artikoloj aperos sub la speciala titolo „Esperanto”.

#### GAŬDO. Nova Filio.

En Gaŭdo kelkaj junuloj fondis „la Gaŭda Unuiĝo Esperantista” „La Venko Estas Nia”.

La unuiĝo iĝis parto de la Holanda Societo Esperantista, estante tio la sesa filio.

La adreso de la Sekretariejo estas So. Ch. Lafeber. Nieuwehaven 153. Gaŭdo. Ni tutkore deziras prosperan kreskadon al la juna Unuiĝo kaj esperas ke multe da forteco eliru el ŝi.

LEEUWARDEN. Ŝanĝo de Adreso.

La adreso de la sekretariejo de la Leŭvardena Klubo „Antaŭen” estas de nun:

So. W. H. J. S. Guise,  
Claes Bockes Balkstraat 31.

Allard, Directeur van het Grand Hotel „Coomans” heeft de Rotterdamsche Esperantisten Vereeniging „Merkurio” thans kosteloos, een prachtige zaal in genoemd hotel, waar zij nu wekelijks elken Donderdag ten 8 uur vergadert.

Gasten zijn er steeds welkom!

De Directeur van het maandblad „De Handel” de Heer J. J. Hoogewerff, heeft zich bereid verklaard van de Rotterdamsche Esperantisten Vereeniging „Merkurio” artikelen omtrent „Esperanto” op te nemen. Deze artikelen zullen verschijnen onder het speciale hoofd „Esperanto”.

#### GOUDA. Nieuwe afdeling.

Te Gouda hebben eenige jongelingen opgericht de „Gaŭda Unuiĝo Esperantista” „La Venko Estas Nia”.

De vereeniging is Afdeling geworden van de Nederlandse Esperantisten Vereeniging, zijnde dit thans de 6e.

Het adres van het secretariaat is: De heer Ch. Lafeber, Nieuwehaven 153. Wij wenschen de jonge vereeniging van harte een voorspoedigen bloei toe en hopen, dat veel kracht van haar moge uitgaan.

LEEUWARDEN. Adresverandering.

Het adres van het secretariaat der Leŭvardena Klubo „Antaŭen” is vanaf heden:

De Heer H. Blok heeft bij de Soci t  Francaise pour la Propagation de Esperanto met  goed gevolg het examen afgelegd voor Profesoro de Esperanto.

Van verschillende zijden ontvingen wij teekenen van instemming betreffende het kenmerk bij de handteekeningen van Esperantisten (Amst. Pioniro No. 9). Een onzer lezers stelde voor, in plaats van  $\bigwedge$  alleen  $\bigwedge$  te gebruiken. Uit het buitenland zijn wij  $\bigwedge$  echter  $\bigwedge$  nog de inzendingen wachtende.

### Een nieuw Esperanto-reclame-artikel.

In al de winkels van de firma C. J. BOELE is thans een nieuw merk sigaren verkrijgbaar. In elk kistje ligt 't volgende reclame-biljet:

Deze sigaar, welke van de fijnste tabakken, geheel uit de hand, vervaardigd is, breng ik in den handel onder den naam Esperanto, en vertrouw, dat de uitmuntende kwaliteit de verspreiding van deze wereldtaal zal bevorderen.

De Fabrikant.

 i tiun cigaron, kiu de l'plej superaj specoj de tabako, estas absolute mana fabrikaĵo, mi enigas en la komercon sub la nomo Esperanto, kaj konfidas ke la bonega kvalito progresigos la disvastigon de  i tiu lingvo internacia.

La Fabrikanto.

### Amsterdama Laborista Societo Esperantista.

Woensdag 13 Mei l.l. hield de Heer Niemor voor bovengenoemde vereeniging voor een aantal gedelegeerden van verschillende arbeiders-vereenigingen, een rede, waarin hij de volgende onderwerpen uiteenzette:

1e. Waarom een Wereldtaal.

2e. Waarom Esperanto.

3e. Het speciale nut van Esperanto voor de arbeidersklasse.

Na in de pauze gelegenheid te hebben gegeven tot het bezichtigen van de voor dat doel medegenomen Esperanto literatuur, ging spreker over tot het voordragen en taalkundig ontleden van het gedicht „La Vojo”.

Na de rede, die veel bijval vond bij de aanwezigen, deelde de voorzitter der Vereeniging, de heer Balm, nog eenige bijzonderheden mede omtrent de werkkring der Vereeniging en het doel van de bijeengeroepen vergadering en sprak hij den wensch uit, dat de afgevaardigden elk in hunne Vereeniging aangaande

het gehoorde rapport zouden uitbrengen, teneinde hun kameraden voor de Esperanto-beweging gunstig te stemmen; bij gebreke belangstelling is de A. L. S. E. steeds gaarne bereid, nadere inlichtingen te verschaffen. Secr. de Heer W. Nutters, v. Ostadestraat 94, Amsterdam.

Verder verzoekt genoemde Vereeniging ons nog te berichten, dat hare conversatie-avonden geregeld elken Donderdagavond plaats vinden te 8½ ure precies in het lokaal Kloveniersburgwal No. 100. Ook vreemdelingen zullen steeds gaarne worden ontvangen.

De A. L. S. E. heeft thans ook de Koninklijke goedkeuring op hare statuten mogen ontvangen.

### Universala Esperanto-Asocio.

Post diversaj klopodoj, la Universala Esperanto-Asocio estas nun oficiale fondita. La provizora regularo ĵus estis akceptita de la delegitoj kaj la komitato rajtigita. La celo de tiu nova, por nia movado tre grava organismo, estas la plifaciligado de la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj. Por tio ĝi organizas per Esperanto diversajn internaciajn praktikajn servojn, tuj uzebla de la personoj, kiuj vojaĝas, korespondas, komercas, rilatas kun allingvanoj pri ĉiaj fakoj. Ĝi klopodas por starigi en kiel eble plej multe da lokoj konsulojn, Esperanto-Oficejojn kiuj helpas al la vojaĝantaj samideanoj; ĝi organizas vojaĝojn, ekskursojn, esperantistajn libertempajn koloniojn, hotelojn, unuvorte klopodas per ĉiuj rimedoj por enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon kaj por la internacia uzado de nia lingvo.

La organizo de la U. E. A. estas starigata sur la jena plano: En ĉiu loko, ke tio estas ebla, estas Delegito, elektata nun de la grupoj aliĝintaj, poste de la U. E. A. anoj. La Delegito reprezentas la komitaton, zorgas pri la interna administrado de la Asocio en sia regiono, klopodas por starigi en sia loko la servojn ĉie organizatajn de la U. E. A. Li mem elektos sian anstataŭanton, siajn helpantojn, kiuj laboras por la funkciado de la diversaj fakoj, ĉiu laŭ sia specialeco, kaj subdelegitojn kiuj en ĉiuj ne grandaj lokoj de ilia regiono reprezentos la delegiton kaj lin helpos por la plenumo de lia tasko. La Komitato, elektita de la delegitoj, estas dividita laŭ diversaj fakoj por kies zorgado estas komisiita unu komitatano kaj helpkomitatanoj nome: Fako 1a. Administrado; fako. 2a. Konsulaj & Esperanto-Oficejoj; fako 3a. Turismo.

Estas anoj de la U. E. A. ĉiuj anoj de la organizaĵoj, kiuj elektis aŭ elektos delegitojn. La anoj havas la rajton senpage

uzi la servojn organizatajn de la U. E. A. Plie, ĉiuj anoj, kiuj pagas la malkaran kotizajon diffuitan en la regularo (24 Sd) ricevos membrokarton, kiu donos al ili la rajton plendi se ili ne ricevis la servojn, kiujn ili rajtas.

Jam ekzistas Deligitoj en 97 lokoj diversregionaj. Post la fondo de la U. E. A. estas nedubeble, ke multaj grupoj, societoj, k.c., kompreninte la praktikan signifon de tiu organizaĵo por nia afero, deziros partopreni en ĝi kaj elekti delegiton. Cirkulero pri tio estas nun dissendita al ĉiuj ekzistantaj organizaĵoj, kiuj estas petataj respondi ĝin kiel eble plej baldaŭ. La grupestroj kiuj ial ajn ĝin ne ricevis, bonvolu skribi al Esperanto, Genève (Svis) 8 Rue Bovy-Lysberg.

La Komitato de la U. E. A. konsistas el: S-roj. H. Bolingbroke Mudie, prezidanto; H. Hodler, vicprezidanto; A. Carles, Th. Rousseau, R. Mesny; S. Meyer; P. Blaise; J. Schmid: D-ro. Whitaker, anoj.

Ni ankoraŭ volas sciigi la nomojn kaj adresojn de la Holandaj delegitoj:

Amsterdam	F <sup>ino</sup>	J. C. Weg, Ceintuurbaan 41, por la Unua Amsterdama Societo Esperantista.
Amsterdam	S <sup>o</sup>	W. Nutters, v. Ostadestraat 94, por la Amsterdama Laborista Societo Esperantista.
's Gravenhage	S <sup>o</sup>	H. J. Bulthuis, Fronemanstraat 6, por la Holanda Societo Esperantista.
Rotterdam	S <sup>o</sup>	H. Stephan, Boomgaardstraat 93, por la Rotterdam Societo Esperantista „Merkurio.”
Utrecht	S <sup>o</sup>	H. R. v. Ollefen, Potterstraat 17, por la Rondo Utrehta Esperantista.

### Pri la Lingva Komitato.

„Ni staras sur firma fundamento: lingvo Zamenhofa, plena kaj viva: ĝin ni konservas ne ŝanceligante. Tio tamen ne signifas, ke, kiel ĉiu lingvo viva, ĝi ne kreskos kaj evolucios, sed nature, tial ke eĉ ĉe artefarita lingvo la evolucito devis esti natura. Por konstati tiun evolucion, por ordigi reguligi ĝin, por teni akordon inter diverslingvanoj ni bezonos, pli malpli frue sed nedube, internacian akademion aŭ komitaton, kies rolo estos ne korekti la lingvon internacian laŭ „aprioriaj” principoj, sed montri laŭ scienca filologia metodo la plej komunan internacian uzon, la

novajn ĝenerale akceptitajn vortojn kaj konservi, sub internacia aŭtoritato kaj kontrolo, la necesan unuecon, la necesan harmonion. Tia komitato estos efektive nur regulatora, sed tio sufiĉas. Malgraŭ kelka kontraŭstaro fine ĉiu akceptos tiun solvon, ĉar ju pli granda la disvastiĝo de Esperanto, des pli necesa tia ilo aperos al ĉiu".<sup>1)</sup>

Tion mi skribis en „Rondiranto” antaŭ pli ol kvar jaroj; tio ŝajnas ankoraŭ al mi absolute vera. Sed por tia tasko ni bezonas Lingvan Komitaton, kiu anstataŭ diskuti pri reformoj „farotaj de ni” laboru simple laŭ la supremontrita metodo. Oni lastatempe kaj diversflanke akre atakis nian Lingvan Komitaton. Eble kun troa severeco. Ĝia malforto devenas de tio, ke ĝi ne ankoraŭ vere scias, ĉu ĝi akceptas aŭ ne la Zamenhofan Fundamenton kiel „netuŝeblan” fundamenton de siaj laboroj. Aŭskultataj konsilantoj dezirus antaŭ ĉio kelkajn „korektojn”: forigon de la tabelo de la neŝanĝeblaj vortoj, aldonon de unu aŭ du prepozicioj (di, k.c.) anstataŭigon de „romano” per „romanjo” k. t. p. Poste sur nova, definitiva (?) fundamento oni laboros! Poste! Poste! — Rektoro Boirac proponos en Dresdeno, diras D-ro Zamenhof, reorganizadon de la Komitato. Lian projekton mi ne konas. Humilege mi nur petas, ke la unua artikolo de l’Regularo de la nova Lingva Komitato estu:

„La fundamento de la laboroj de la Lingva Komitato estas la verketo Fundamento de Esperanto, en kiu neniu komitatano, aŭ nekomitatano, havas la rajton proponi ŝanĝon”.

Kaj sur tiu fundamento oni nur konstruu! Ĝi estas sufiĉe firma.

Th. CART,

Membro de la Lingva Komitato.

**Alvoko al la Holandaj  
vizitontaj de la Dresdena  
Kongreso.**

Ni petas ĝentile al niaj Holandaj gesamideanoj, kiuj havas la intencon viziti la Dresdenan Kongreson, bonvole sciigi tion al ni.

**Oproep aan de Nederland-  
sche bezoekers van het  
Congres te Dresden.**

Wij richten tot onze Hollandsche geestverwanten, die van plan zijn het Congres te Dresden te bezoeken, het vriendelijk verzoek, ons daarvan wel mededeeling te willen doen.

**La Kristana Kunveno dum la Dresdena Kongreso.**

La okuloj de la tuta Esperantistaro nun direktiĝas Dresdenon (en Germanujo), kie dum la venonta Aŭgusto (de la 16a

<sup>1)</sup> El Rondiranto, monata organo de l’Bulgaraj Esperantistoj, Febr. 1904.



gis 22a, okazos Esperantista kongreso internacia. Multaj specialaj kunvenoj de diversaj fakoj kaj celoj estas aranĝataj por la kongreso.

Sed ni ne ankoraŭ kuraĝis pripensi ian apartan aŭ oficialan kunvenon; ni ne esperis trovi en Dresdeno multajn aliajn amikojn de nia ligo. Kaj tamen, ni ricevis subite antaŭ kelkaj tagoj leteron el Kóbenhavn (Danujo), per kiu unu kara Dana amiko anoncis sian viziton en Dresdeno. Li eĉ proponis atentiĝi niajn samideanojn al la Dresdena kongreso per Esperanta ĵurnalo.

Tiamaniere estus eble, persone interligiĝi kun aliaj fratoj en Kristo, kiuj venos Dresdenon. Nia Dana amiko do tre ĝojis, ricevinte nian gazeton nro 2, kie troviĝas la sciigo, ke en la Dresdena „K. U. J. V.” jam ekzistas Esperantistoj.

La citita letero instigis nin, sincere konsideri specialan kunvenon de membroj de nia mondligo aŭ eĉ de ĉiuj fratoj en Kristo. Ĉiu estu kore bonvena en Dresdeno. Treege ni bedaŭrus, se iu el niaj Kristanaj fratoj restus en Dresdeno kaj havus nenian okazon, intersanĝi kun ni siajn spertojn. Ĉu ne estas rekomendinde, ke kunvenu ĉiuj veraj Kristanoj sen apartigo? La apartigo povas okazi pli malfrue, kiam la nombro de niaj Esperantistoj fariĝos tro granda por komuna preparolo pri la laboro en la regno de nia Sinjoro.

Ni volas ja meti nian tutan forton en la servon por Kristo, precipe nian karan lingvon. Se ni vojaĝas Dresdenon, tio ne devas okazi nur je nia popra plezuro. Nia sola kaj plej bona plezuro, nia plej bela ĝojo estu, fidele sekvi nian Sinjoron Jesuon, ankaŭ dum la restado en Dresdeno.

Sro Viljo Reichelt, Dresden (Germanujo) Sebnitzerstrato 32 aranĝos volonte nian kunvenon kaj donos al ĉiu partoprenonto la necesajn informojn.

(El Esperanto en la Servo de la Dia regno).

### Avizo al la katolikaj esperantistoj pri la Dresdena Kongreso.

La Komitato Katolika dum la Dresdena Kongreso estas jam starigita. Jen la nomoj de la komitatanoj:

Prezidanto: La Respektinda kanoniko Pichot, Prezidanto de la „Institut de la Paix” Monako (Princlando).

Sekretario: Abato Austin Richardson, profesoro en la „Institut St. Louis” Bruselo.

Direktoro por la Diservoj dum la kongreso: Pastro Frohns, parokestro de Warstade (Hanovro) (Germanujo).

Sekretario de la S. K. I.: Abato Derroite, Parizo.

Sekretario de la P. E. F.: Abato Richardson.

La religia diservo, meso kun prediko en esperanto de l'Abato Pichot, tre volonte permesataj de la Dresdena episkopo, okazos la 16<sup>a</sup> aŭgusto kredindeble en la nova preĝejo de la SS. Koro de Jesuo str. Porsberg, je la duono de la 12<sup>a</sup>, aŭ en la preĝejo de S. Josefo, granda str. de Plauen, je la duono de la 10<sup>a</sup>.

La Katolikaj esperantistoj estos avizataj pli malfrue per alia avizo aŭ per la lokaj gazetoj. La preĝejo ne povis ĝis nun esti elektata pro la taŭgeco de la horo. Oni volas eviti la koincidon de la diversaj diservoj.

La Komitato.

### Al la komitato de la kvara kongreso.

La grandaj diskutoj, kiuj aperis en nia Esperantistujo post la decido de la Delegacio por alpreno de Internacia Lingvo, montris, unu fojon plie, ke oni devas aranĝi aliamaniere la L. K. por ke ĝi estu rajta por respondi kaj decidi je la nomo de la tuta Esperantistaro. Ni ne volas diri ke ĝiaj decidoj estu devigaj por ĉiuj, ne. Lingva Komitato devos esti kiel la naciaj akademioj sciencaj, kiuj konsilas la uzadon de tio aŭ tio ĉi. Ĉiu povas ne preni la konsilojn de L. K. kaj aranĝi novajn lingvojn aŭ esprimojn ekster Esperanto.

Tamen la nuna aranĝado de L. K. iomete entuziasme akklamita en Bulonjo estas tiel malfortika, ke eĉ ĝi mem ne kredas sin sufiĉe antoritata por fine decidi pri io ajn.

Tial la Brazila Ligo Esperantista decidas peti al la Komitato de la 4a Kongreso, ke ĝi bonvolu meti en la tagordon la jenan projekton :

### PROJEKTO PRI LINGVA KOMITATO

#### I

#### CELO.

§ 1o. La evoluado de la lingvo Esperanto estas per universala konsento submetita al la kontrolado de Lingva Komitato.

§ 2o. La tasko de tiu komitato estos ricevi, ekzameni kaj pricideci la petojn de tolerado de novaj formoj aŭ radikoj en la nuna lingvo.

§ 3o. La Komitato ne povos ekzameni kian ajn proponon, kiu celus ŝanĝi la signifon de iu radiko fundamenta aŭ malpermesi la uzadon de iu ĝis nun korekta gramatika formo.

§ 4o. Tial ke la komitato disponas je nenia sankcio por apogi siajn decidojn, la respekto de ĉi tiuj estas devigata al la esperantistoj nur praktikaj konsideroj de necesa unueco.

II

ORGANIZADO.

§ 5o. Por faciligi sian taskon, la L. K. estas dividita en tri partoj:

- 1o. Anoj konsilantaj;
- 2o. Redakta Komitato;
- 3o. Korespondantoj.

§ 6o. La Anoj Konsilantaj konsistos el kelkaj personoj elektitaj de Dro Zamenhof inter la esperantistoj konataj pro sia lingvistika <sup>1)</sup> kompetenteco, tiamaniere ke almenaŭ ĉiu granda lingva grupo estu riprezentata.

Plie tiu titolo estos proponata al diversaj konataj faksciencistoj esperantistaj.

§ 7o. La rolo de la Anoj Konsilantaj estas doni sian privatan opinionon pri la taŭgeco filologa, teknika, filozofa aŭ praktika de la enkonduko proponata, kaj aprobi aŭ ne ĝian laŭvolan uzadon.

§ 8o. La Redakta Komitato konsistos el diversaj pagataj oficistoj kies laboro estos ricevi la proponojn transsenditajn de la korespondantoj aŭ senpere adresitajn, kaj se tiuj estas konsiderindaj, ilin komuniki por opinio al la konsilantoj.

§ 9o. Propono estos konsiderinda:

1e se ĝi venas de kongreso internacia aŭ de grupo aŭ societo kun almenaŭ 100 aprobantaj subskriboj.

2e se, kvankam venantan de aparta persono, la Redakta Komitato ĝin opinias interesa kaj konforma al la ĝeneralaj principoj de la lingvo.

§ 10. La Redakta Komitato devos respondi al ĉiu petonto, ĉu lia propono estas konsiderata kaj submetata al ekzameno, aŭ forĵetata, kun la kialoj, antaŭ unu monato post ĝia ricevo.

§ 11. Korespondantoj estos nomataj de la Redakta Komitato po unu en ĉiu granda esperantista centro. Ilia tasko estos ricevi kaj transsendi ĉiun proponon kun detala raporto pri la proponanta persono aŭ aro. Tiu raporto restos sekreta.

---

**Ekzemplo de funkciado.**

Oni supozas, ke grupo ia volas uzi specialan vorton por la pronomo multnombra in-seksa kaj proponos la vorton ILINI por tio

1o. La Korespondanto sendas tiun proponon al la Redakta Komitato.

2e. Sub tiu formo la propono ne estas konsiderinda tial ke ĝi modifus la sencan de ILI, vorto fundamenta.

<sup>1)</sup> Kaj ne poliglota.

La R. K. ĝin redaktas ĉi-tiel:

„La grupo esperantista en X . . . petas la permeson uzi en okazo de neceseco la vorton ILINI por . . . ke”, kaj ĝin dissendas, en monata cirkulero, kun la aliaj konsiderindaj proponoj, al ĉiu ano konsilanta.

3e. Ricevinte la respondojn de la konsilantoj, la Redakta Komitato publikigas la rezulton de la respondoj:

tiom jes

„ ne

„ senopinie.

Se la sumo de la opinioj jes + senopinie superas la  $\frac{2}{3}$  onojn de la tuto, la Komitato Redakta deklaras:

„En okazo de neceseco, oni povas uzi la vorton ILINI kiel pronomo multnombra in-seksa.

„La vorto ILI konservas sian signifon ambaŭ seksan”.

Rezume:

— **Tolerado**—kaj ne— **ordono**.

— ĉio kio ESTIS bona, ĉiam ESTAS bona, eĉ se oni havas la liberecon uzi pli bonan.

La Komitato de la Brazila Ligo Esperantista.

Everardo Backheuser, prezidanto.

Reinaldo Fred. Geyer, sekretario.

M. T. Paiva Araujo, kasisto.

**KOSTELOOS INTERNATIONAAL KANTOOR <sup>1)</sup>**  
**van Handelsreizigers.**

—0—

*Amikejo (Moresnet-Onzydig,) April 1908.*

**MIJNHEER.**

Het ontwerp van den leeraar Gustave Roy tot het veranderen van het onzijdig gebied Moresnet, middenpunt der volkeren, in een esperantische Staat waar de internationale congressen zouden gehouden worden en waar de handel met alle volkeren zijn ministerie zou bezitten, heeft hier niet alleen een gunstig onthaal ontvangen van wegens de overheden en de be-

<sup>1)</sup> Deze omzendbrief werd in zeven talen vertaald en naar de bijzonderste steden der wereld gezonden.

volking, maar heeft zelfs van zekere philanthropen de eerste sommen gelds bekomen voor een werk waarin de handelsreizigers van alle landen belang hebben.

*Van nu af is een kosteloos internationaal kantoor voor handelsreizigers gesticht. Binnen eenige weken zal de opening er van plaats hebben.*

De reizigers en vertegenwoordigers des handels, zijn verzocht het internationaal Congres der reizigers en vertegenwoordigers des handels bij te wonen, dat zal plaats hebben te Parijs, den 4, 5, 6 en 7 Juni aanstaande. Mijnheer de Professor, Gustave Roy, zal er het woord nemen. Zich doen inschrijven in het Secretariaat van de Federatie des Handelsreizigers en vertegenwoordigers, 48, rue de Bondy, Paris.

Wat elk reiziger doen moet zonder uitstel.

Ten einde de goede werking van het kantoor te verzekeren, moet elk reiziger, zoo haast mogelijk, naar het esperantisch consultaat van Amikejo zenden, de hierbij gevoegde tabel ingevuld en ondertekend.

#### Werkings van het Kantoor.

Alle verrichtingen van het kantoor zijn kosteloos:

- 1o. Het meldt aan de industriëelen van alle landen de aanvragen tot bedieningen gedaan door de reizigers voor handelshuizen;
- 2o. Het maakt den reizigers de openstaande plaatsen bekend;
- 3o. Het geeft inlichtingen omtrent alle industrie en alle handel der wereld;
- 4o. Het verschaft hun representaties voor inlandsche en buitenlandsche huizen;
- 5o. Het vergemakkelijkt hun de betrekkingen onder elkander tot het verwisselen der handelsreizen.

CHARLES SCHRIEWER,

Esperantist consul te Amikejo,  
Moresnet-Onzijdig over Moresnet (België).

Frankeeren : 12½ cents. (Voor België : 10 Centiemen).

---

#### Ĉekoj internaciaj

La direkcio de „Esperanto” (Ĵurnalo) sendis al ni 2 speci-

menojn de internaciaj ĉekoj, skribitaj en Esperanto kaj kun valoro montrita per spesmiĵoj. Tiuj ĉekoj, eldonataj de la „Bankverein Suisse” (Bankunio Svisa), kaj Sroj Ern. Pictet & Kio, Genève, estas kiel bonaj propagandiloj haveblaj laŭ peto kaj senpage ĉe Esperanto-Jurnalo”, 8 Rue Bovy Lysberg, Genève.

La Poliglota Klubo (Polyglot club) en Londono petis nin sciigi, ke ĝia programo de poliglotaĵoj ankaŭ enhavas Esperantajn kunvenojn je la 4a Dimanĉo de ĉiu monato, en kiuj fremdaj Esperantistoj ĉiun kore estos akceptataj.

### Jubilea Ekspozicio en Praha (Praĝo).

La „Časopis Českých Esperantistů” petas nin publikigi ke la prepara Komitato de la supre nomita ekspozicio invitos oficiale en nomo de centra societo de Bohemaj Esperantistoj „Bohema Unio Esperantista” la kongresanojn Dresdenajn por postkongresa ara vizito de Praha kaj de la ekspozicio. Informojn donas la konsuloj: S-oj. Ing J. Hofman, Praha, Smichov, 1054 Arch. C. Nebuska, Praha II Jenstejska 4, kaj Ed. Kühnl, redaktoro „Časopis Českých Esperantistů” (Praha II 2023—7.)

### Broŝuroj kaj libroj ricevitaj:

l'Esperanto et les Institutions publiques frs. 1,25.  
 Esperanta Societaro 31 Dec. 1907 ” 1.50.  
 (Ambaŭ eldonitaj de „Esperantista Centra Oficejo” 51 Rue de Clichy, Paris)

Formulo pri malarmo, precipe rilate al la Brita propono pri malarmo. (El germana lingvo tradukis P. Christaller) Paris, Presa Esperantista Societo frs. 0,25.

Grand Dictionnaire Français Esperanto.  
 Huitième fascicule. Presa Esp Societo.

Evolucio libera aŭ Akademio de A. Michaux.

Sub la Neĝo. Taglibro de juna loĝanto de la Jura montaro de J. J. Porchat. Esperantigis J. Borel.  
 Esperanto-Verlag Möller und Borel. Berlin. S. 0.50 Sm.

La Vangfrapo de Abraham Dreyfus.  
 Tradukis Ŝ. Sar.  
 Librairie de l'Esperanto fr. 0.75

Ifigenio en Taŭrido. Dramo en kvin aktoj de Goethe. El germana lingvo tradukis L. L. Zamenhof. Esperanta-Verlag Möller und Borel. Berlin 0.80 Sm.

Esperantista Kantaro, 13 kantoj originalaj aŭ esperantigitaj por 4 voĉoj miksitaj.  
Eldonita de Karl Jost. Zürich. 0.40 Sm.

Malnovaj paĝoj el Lingvo Internacia, Unua Serio 1896. Presa Esp. Societo frs. 1.25.

H. K. Bouška. Slovakoj kaj Magiaroj.  
Václav Riegel en Praha—11—1687 (Bohemujo) 50 Hel.

6. poŝtkartoj ilustritaj de L. Rodo; Grandjouan; Malteste; Willaum, Bern—Klene; Hermann—Paul. Prezo de 1' kolekto (afrankite) 0.50 fr.

Ĉe la asocio „Paco—Libereco”  
Rue de Saintonge—Paris (France). 0.45 fr.

PRAHA: ILUSTRITAJ POŝTKARTOJ KUN ESPERANTA TEKSTO estas eldonitaj de Esperantista Klubo en Praha. La unua serio enhavas kvin belajn fototipe presitajn vidaĵojn je rimarkindaj konstruaĵoj en Praha: Hradčany kun reĝa kastelo. Turoj de ŝtona ponto. Preĝejo „Tyn”. Preĝejo de s. Nikolao. Bohema nacia teatro. Sur la duono de adresflanko estas presita klarigo pri la urbo kaj ĝia signifo kiel centro de bohema vivo kaj de bohema movado esperantista. Negranda loko estas rezervita por sciigo. Prezo de la karto 6 hel. Adresu al S-o J. Vohnout, konsulo de Esperantista Klubo en Praha 1. Centra poŝta oficejo.

Aperis bela prospekto de firmo Seidel & Naumann en Dresden pri la skribmaŝino „Ideal”. Oni povas ricevi senpage la belan katalogon, se oni sendas respondkupono al la firmo Seidel & Nauman en Dresden.

FRATECO. Ĉiumonata folieto por la Esperanta propagando inter laboristoj. Holanda kaj Esperanta.

Eldono de la Generala Esperanta Laborista Klubo en Hago.  
Redaktoro: J. L. Bruijn, Kepplerstr. 170 Hago.

Administranto: J. Lüneman, Van der Neerstraat 40, Hago.  
Abonprezo: Holando kaj Belgujo. 20 Sd. jare

Aliaj landoj 33 Sd. jare

Majo 1908: Esperanta Internacia Revuo.

Industria komerca, eksporta, filatelia, reklama, kaj literatura gazeto Direktoró: A. de Marich. Estro de la Administracio: Josefo Erdei. Budapeŝt, Ŭllóí út 59.

Abono: jare 2.08 Sm. (Aperas en 30.000 Ekzempleroj).

„Sciiganto” por membroj de Hungara Esperantista Societo. Eldonita de la Komitato de H. E. S. Ciumonate.

„Esperanto en la servo de la Dia regno”.

Monataj raportaj pri la disvastiĝo de Esperanto inter „Kristanaj Unuigoj de junaj Viroj (K. M. J. V.) Aperas nur Esperante Jarabono 0,50 Sm.

Eldonanto: P. Hübner. Friedrich Wilhelmstrasse 66 Mülheim am Rhein (Germanujo.)

Oficiala Gazeto Esperantista. Organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la kongresoj.

Redakcio kaj Administracio: 51 Rue de Clichy. Paris.

Jara abono: 5 frankoj.

---

#### Deziras korespondi:

Max Bousquet, 22 Rue Burderu, Roanne (Loire) France.

Hermann Wuttke Jr., Pionierstrasse 21 Magdeburg.

Faiĝi Jamago ĉe Jurakŝa, Marnouéi, Tokio, Japan.

Emilio Baez, Pelayo, 24, 2o Valencia (España).

Frant. Groh Jiĉin Bohemio (Aŭstrio).

Milo Novak, zizka placo „Kumburk” Jiĉin (Bohemio).

John Kaukal Akademiko. Prossnitz (Aŭstrio) Kravarstrato 7.

Esperanta Grupo en Condé p/a Leŭtenanto Manevy.



Rilate al pliaj novaĵoj, ni precipe atingigas la interesatojn je la sekvanta listo de Esperantaj gazetaĵaj, ĵus ricevitaj de ni interŝanĝe, kaj ĉiam laŭ peto prunte riceveblaj ĉe la sekretarioj. (Oni sendu ĉiam poŝtmarkon por eblaj afrankoj):

- × The American Esperanto journal,
- × Belga Sonorilo.
- × Brazila Revuo Esperantista.
- × The British Esperantist.
- × Časopis Českych Esperantistu. *ve*
- × Eho Esperantista.
- × Esperanta Internacia Revuo (No. 1.)
- × Esperantisten.
- × Esperanto.
- × The Esperanto Instructor (La Esp. Instruista).
- × Espero Katolika.
- × Espero Pacifista.
- × Estlanda Esperantisto.
- × L'Etoile Esperantiste.
- × Eŭropa Kristana Celado (Unuafoje Esperante kaj Angle).
- × Filipina Esperantisto.
- × Finna Esperantisto.
- × Germana Esperanto-Gazeto.
- × Internacia Socia Revuo.
- × Pola Esperantisto.
- × Progreso.
- × Rumana Esperantisto.
- × Rumena Gazeto Esperantista.
- × La Suno Hispana.
- × Stelo Kataluna.
- × Tutmonda Espero.
- × Verda Stelo.
- × Voĉo de Kuracistoj.
- × Amerika Esperantisto.
- × La Spritulo.
- × Dana Esperantisto.
- × Hispana Revuo.
- × Bulgara Esperantisto.
- × Germana Esperantisto.
- × Dée Weltwarte.
- × Algemeen Militair Weekblad. *ve*
- × Japana Esperantisto.
- × Juno Esperantisto.
- × La Revuo.

## Esperantaj Markoj

por fermi kovrilojn kaj por esti  
algluitaj sur ĉiuj korespon-  
daĵoj.

Bonega propagandilo. Estas  
liverotaj je ĉiaj koloroj :

verda kun ruĝa,

blua, nigra, flava

k. t. p. La lite-

roj kaj la stelo

estas subpresataj. (vid

interstarantan modelon).

Prezo :

100 ekz. 0.50 Sm.

1000 „ 3.— Sm.

5000 „ 12.— Sm.

10000 „ 20.— Sm.

afrankita,

Aĉetebraj :



## Esperanto Zegels.

voor het sluiten van envelop-  
pen en om geplakt te worden  
op alle correspondentie.

*Het propagandamiddel bij  
uitnemendheid.*

Worden geleverd in

alle kleuren : groen

met rood, blauw

zwart, geel enz.

De letters en de ster

zijn „en relief” gedrukt.

(zie nevenstaand model).

Prijs :

100 ex. 0.50 Sm. = f 0.60

1000 „ 3.— „ = f 3.60

5000 „ 12.— „ = f 14.50

10000 „ 20.— „ = f 24.—

franco.

Verkrijgbaar :

Holanda Oficejo Esperantista.

**Singel 386, Amsterdam.**

(Estas preferinde ĉiam sendi la sumon antaŭe.)

Ĵus aperis la jam tiel  
longe atenditaj

Zoo juist verschenen de  
reeds lang verbeide

# Holandaj Ŝlosiloj

verkitaj laŭ la

„Esperanto Key”

de

**H. BLOK.**

Instruisto al la Pitmanlernejo,  
Amsterdam.

**MENDU TUJ!  
MENDU TUJ!**

# Hollandsche Sleutels,

samengesteld naar de

„Esperanto Key” -

door

**H. BLOK.**

Leeraar a/d Pitmanschool  
Amsterdam.

**BESTEL DADELIJK!  
BESTEL DADELIJK!**

Aĉetebraj ĉe la

**Holanda Esperanta  
Oficejo**

**SINGEL 386,**

— **AMSTERDAM.** —

Verkrijgbaar aan het

**Holanda Esperanta  
Oficejo.**

**SINGEL 386,**

— **AMSTERDAM.** —

Kostoj: 2 Sm. po 100 ek-  
zempleroj sendataj aŭ frankitaj.

Prijs: f 2.50 per 100 exem-  
plaren franco per post.

∴ ANONCOJ. ∴

# Leert ESPERANTO aan de PITMANSCHOOLO.

AMSTERDAM.



Dir. G. ANNEVELDT.

PROSPECTUS OP AANVRAAG.

D. G. M. DE VRIES,

ASEKUROJ, HIPOTEKOJ, KREDITOJ,

ĈEFOFICEJO Damstraat 16, Amsterdam.

BRANĈOFICEJO, Weesp, Hoogstraat 14.

Direktoro, T. J. HAAPE.

Korespondado kaj preparoloj en Esperanto.

Generala Riprezentanto de la unuaj enlandaj kaj eksterlandaj Societoj.

## GRANDA HOTELO „COOMANS”

ROTTERDAMO, HOLANDO

Hoofdsteeĝ 12-22.

CENTSEPDEK KVIN ĈAMBROJ.

ELEKTRA LUMIGADO.

CENTRA VARMIGADO.

TRI ELEKTRAJ LEVIGILOJ.

Prezo po 1 lito, enkalkulite matenmanĝon, 1.75 Guldenoj ĝis 2.75 Guldenoj.

Direktoro G. ALLARD.